Květen — Majo 1904 Nro 5

ROČNÍK II
JARO II

ČESKÝ ESPERANTISTA

Měsíčník pro šíření pomocného jazyka mezinárodního

ORGÁN
»Rakouského spolku Esperantistů« v Brně a »Klubu Esperantistů« v Praze.

ORGANO
de »Aŭstria societo Esperantista« en Brno kaj de »Klubo Esperantista« en Praha.

Redaktor české části: KRUMPHOLC JOS.

Redaktoro de l' parto Esperanta: ČEJKA TH.

OBSAH:
ENHAVO:

Redakcio & administracio:
BYSTŘICE-HOSTÝN
Moravio. Aŭstrio.

Roční předplatné 3 K. Číslo po 40 h.
Jara abono 3·50 fr. Nro po 45 cent.

Členové spolku Brněnského i klubu Pražského dostávají „Č. E.“ zdarma.

ČESKÝ ESPERANTISTA

Monata gazeto por la propagando de Esperanto. Estas eldonata en kajeroj 16-paĝaj.

Nepresitajn manuskriptojn la redakcio redonos, se oni aldonis poŝtan markon por la resendo. — Poŝtaj markoj (kiel abonpago) estas akceptataj nur por $^3/_4$ de ilia valoro.

Represo kaj eĉ traduko de ĉiuj artikoloj estas permesita, sed sub jenaj kondiĉoj: 1. Citi nian gazeton. 2. Sendi al la redakcio 3 ekz. de tiu presaĵo, en kiu troviĝas la artikolo aŭ traduko.

Por ĉiu respondo, kiun oni deziras ricevi de la redakcio aŭ administracio, estu aldonita poŝta marko aŭ karto.

TELEFONO DE REDAKCIO.

Českým esperantistům překladatelům. Františku Palackému bylo překládání kusem sebevýchovy, Masarykovi je školou pronikavého čtení — ale jistě nemálo záleží také na tom, *co* překládáme. Poznává-li se člověk už ze čtení, čím více poznává se z překládání, z volby látky . . .! Myslíme, že známá rada Goethova: »Pro děti nejlepší jest jen dosti dobrým«, měla by — mutatis mutandis — platiti nejen pro vychovatele, než i — pro překladatele. — **Al Rusoj.** Kiu klarigus al ni devenon de nomo »Českaja guba«? (Golfo en norda maro oriente de Kanin.) — S-o **M. Ambros**, St. Peterburgo: De firmo »Wolff & Co« ni ne ricevis vian abonpagon. Ni preferas sendi abonpagon rekte al ni, ĉar ni ne povas doni rabaton al libristoj. Kiu abonigis s-on Boldin? Pri tio ĉi ni scias tute nenion. — Ankoraŭ **hungara loterio!** Ni estis petitaj de kelkaj flankoj repreni nian averton pri hungaraj loterioj, kiun ni publikigis en 10. Nro (1903) de »Č. Esp.« Bedaŭrinde ni ne nur ne povas fari tiel, sed kontraŭe, ni avertas refoje kaj denove ripetas publike, ke jus tiu loterio (ne banko!), kiu eluzis adresojn de esperantistoj por sendi al ili leterojn kun bliudigaj promesoj pri gajno, estas trompo kaj vera humbugo. Pri tio ni donos al ĉiu, kiu petos tion de ni, oficialajn dokumentojn. Regnaj oficoj en Aŭstrio (Cislajtanio) eldonis specialan averton pri loterioj hungaraj kaj aldonis al ĝi nomaron de tiuj firmoj, kiuj aranĝas tiajn loteriojn. Inter tiuj firmoj troviĝas ankaŭ »Merkurbank« en Budapesto. Ni do tute prave avertis niajn legantojn. Ni ne juĝas antaŭ ol ni havas dokumentojn en manoj! — S-o **Vlad. Ogorodnikov**, Vjatka (Rus.): Se vi havas tradukojn de rusaj aŭtoroj, alsendu. Cion taŭgan ni publikigos laŭ ebleco. Ni estus al vi dankaj, se vi povus alsendi ne nur beletristikaĵojn, sed ankaŭ artikolojn nebeletristikajn — pri kia ajn demando komune interesa (esceptinte politikon!). Tradukn aŭ verku originale. Komence vi ne bezonas skribi longajn artikolojn. Diru ĉion mallonge kaj esence! — **„Skribu legeble“**, tion memoru ĉiu esperantisto. Legebla, klara skribo estas kiel nature ĝentila konduto de homo. Ĉu pensu, ke tiu malgranda peno skribi legeblajn literojn estas multe pli malgranda ol tiu peno kaj tempoperdo de okupita homo, kiu devas deĉifri tiajn hieroglifojn. Do ni petas pri internacia ĝentileco, t. e. *legebla skribo!*

POTŘEBA-LI JAZYKA MEZINÁRODNÍHO?

ĈU LINGVO INTERNACIA ESTAS BEZONA?

Výňatek z řeči *L. de Beaufronta* na kongresu spolku »Association Française pour l' Avancement des Sciences« v Paříži 1900.[1]

(Pokračování.)

Pomyslili jste už na to, co vlastně povzneslo lidstvo tak nedosažitelně vysoko nad všeliká zvířata, jež přece vpravdě ustrojena jsou dle téhož vzoru jako člověk? Za všechnu svou vysokou osvětu a vzdělanost děkujeme jen jednomu: ovládání jazyka, jež umožnilo nám výměnu myšlenek. Co bylo by z nás, pyšných králů světa, kdybychom nemohli jazykově vzájemně se stýkati, kdybychom všechno své vědění a vzdělání od počátku měli každý sám si vypracovávat místo užívati — dík výměně myšlenek — hotových již plodů zkušenosti a rozličných věd celých tisíciletí, celých millionův a milliard jiných podobných nám tvorů? Tehdy snad nestáli bychom ni o stupínek výše než rozličná ta zvířata, jež nás obklopují a jež jsou tak nerozumna a bezmocna! Zbavte nás rukou a nohou a čeho chcete, ponechejte nám však možnost výměny myšlenek — a zůstaneme týmiž králi přírody a budeme se stále a nekonečně zdokonalovati; dejte nám však třeba sto rukou, dejte nám každému třeba sto rozličných posud neznámých pocitů a schopností (mohutností), odej-

Ĉu vi ekpensis iam pri tio, kio propre levis la homaron tiel neatingeble alte super ĉiuj aliaj bestoj, kiuj ja en efektiveco estas konstruitaj laŭ tiu sama tipo, kiel la homo? La tutan nian altan kulturon kaj civilizacion ni dankas nur al unu objekto: al la posedado de lingvo, kiu ebligis al ni la interŝanĝadon de pensoj. Kio estus kun ni, fieraj reĝoj de la mondo, se ni ne povus lingve komunikiĝadi unuj kun aliaj, se sian tutan scion kaj inteligentecon ĉiu el ni devus de la komenco mem ellaboradi al si mem, anstataŭ faradi uzon — dank' al interŝanĝo de pensoj — de la jam pretaj fruktoj de la sperto kaj diversaj scioj de tutaj miljaroj, de tutaj milionoj kaj miliardoj da aliaj similaj al ni kreitaĵoj? Ni tiam eĉ per unu plej malgranda ŝtupeto ne starus pli alte ol tiuj diversaj bestoj, kiuj nin ĉirkaŭas kaj kiuj estas tiel sensaĝaj kaj senhelpaj! Forprenu de ni la manojn kaj la piedojn kaj kion vi volas, sed lasu al ni nur la povon interŝanĝadi la pensojn, — kaj ni restos tiuj samaj reĝoj de la naturo kaj ni konstante kaj senfine perfektiĝados; sed donu al ĉiu el ni eĉ centon da manoj, donu al

---

[1] Dr. L. Zamenhof: »Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto«. Paris, Hachette et Cie, Boulevard Saint-Germain, 79. 1903. — str. 274.—279.

měte nám však možnost výměny myšlenek — zůstaneme nerozumnými a bezmocnými zvířaty. Měla-li však značně neúplná a velmi omezená možnost výměny myšlenek tak obromný význam pro lidstvo, považte, jak ohromný a s ničím nesrovnatelný užitek přinesl by lidstvu ten jazyk, který by učinil výměnu myšlenek úplnou, a jehož zásluhou mohl by nejen A dorozumívati se s B, C s D, E s F, nýbrž každý z nich s každým jiným! Ani sto největších vynálezů nezpůsobí v životě lidstva tolikého a tak blahodějného převratu, jako zavedení jazyka mezinárodního! Vizme několik malých příkladů. Snažíme se o překlad spisů každého národa do jazyků všech jiných národů; ale to pohlcuje neplodně obrovské množství prací a peněz a přece přes to všechno můžeme přeložiti jen nejnepatrnější část lidské literatury a ohromná většina této literatury s bohatými zásobami rozličných myšlenek pro každého z nás zůstává nedostupnou.

Kdyby však existoval jazyk mezinárodní, tu vše, co zjeví se v oblasti myšlenky lidské, bylo by přeloženo jen v tento jediný jazyk neutrální a mnohá díla byla by přímo v tomto jazyku psána, a všechny výtvory ducha lidského staly by se přístupnými každému z nás. Pro zdokonalení jednotlivých odvětví lidských věd pořádáme mezinárodní kongres za kongresem, — jak bídnou však hrají úlohu, když účastniti může se jich ne ten, kdo skutečně s užitkem přál by si něco uslyšeti, ne ten, kdo skutečně o něco vážného chtěl by se sděliti, nýbrž jen ten, který umí »mluviti« několika jazyky. Život náš je krátký, a věda obsáhlá;

ni eĉ centon da diversaj ĝis nun nekonataj sentoj kaj povoj, sed forprenu de ni la povon de interŝanĝado de pensoj — kaj ni restos sensaĝaj kaj senhelpaj bestoj. Sed se la tre neplena kaj tre limigita ebleco de interŝanĝo de pensoj havis por la homaro tian grandegan signifon, ekpensu pri tio, kian grandegan kaj kun nenio kompareblan utilon donus al la homaro tiu lingvo, kiu farus la interŝanĝadon de pensoj plena, kaj dank' al kiu ne sole A havus la eblon kompreniĝadi kun B, C kun D, E kun F, sed ĉiu el ili povus kompreniĝadi kun ĉiu el la aliaj! Tuta cento da plej grandaj elpensoj ne faros en la vivo de la homaro tian grandan kaj bonfaran revolucion, kian faros la enkonduko de lingvo internacia! Ni prenu kelkajn malgrandajn ekzemplojn. Ni penas tradukadi la verkojn de ĉiu nacio en la lingvojn de ĉiuj aliaj nacioj; sed tio ĉi englutas ja neproduktive grandegan multon da laboroj kaj mono kaj tamen malgraŭ ĉio ni povas traduki nur la plej sensignifan parton de la homa literaturo, kaj la grandega plimulto de la homa literaturo kun riĉaj provizoj da diversaj pensoj por ĉiu el ni restas neakirebla. Sed kiam ekzistus lingvo internacia, tiam ĉio, kio aperas en la regiono de la homa penso, estus tradukata nur en tiun ĉi unu neŭtralan lingvon kaj multaj verkoj estus skribataj rekte en tiu ĉi lingvo, kaj ĉiuj produktoj de la homa spirito fariĝus akireblaj por ĉiu el ni. Por la perfektigado de tiu aŭ alia branĉo de la homaj scioj ni aranĝas sur ĉiu paŝo internaciajn kongresojn, — sed kian mizeran rolon ili ludas, kiam partopreni en ili povas ne tiu, kiu efektive kun utilo dezirus ion aŭdi, ne tiu, kiu efektive ion gravan volus komuniki, sed nur tiu, kiu scias babiladi en kelkaj ling-

jest se nám učiti, učiti, učiti! K učení se můžeme věnovati jen část svého krátkého života, zejména svá léta dětská a jinošská; však ó běda! velká část drahého času tohoto prchá zcela neplodně k naučení se jazykům. Kolik bychom dosáhli, kdybychom zásluhou existence jazyka mezinárodního celý čas, obětovaný neplodnému učení se jazykům, věnovati mohli osvojení si skutečných a positivných věd! Jak vysoko pak vzneslo by se lidstvo!...

Však dosti již o tomto, neboť jakkoli by každý z našich posluchačů tíhl k jiné a jiné formě jazyka mezinárodního, pochybujeme, našel-li by se mezi nimi i jediný jen, jenž by pochyboval o skutečné užitečnosti jazyka takového. Poněvadž však mnohým, kteří nezvykli si přesný počet vydávati ze sympathií svých a antipathií, obyčejně zdá se, neuznávají-li té či oné formy nějaké ideje, že nutno jim dokonce napadati ideu samu, žádáme — aby rozbor náš měl jakýsi systém — žádáme všech svých vážených posluchačů, aby si především dobře zapamatovali, že o užitečnosti jazyka mezinárodního vůbec — kdyby byl zaveden — nepochybují. Zapamatujte si tedy, pánové, dobře prvý úsudek, k němuž jsme došli, poznamenejte si a zapamatujte, že souhlasíte s tímto závěrem:

Existence jazyka mezinárodního, kterýmž by se dorozumívati mohli lidé všech zemí a národů, přinesla by lidstvu ohromný prospěch.

voj. Nia vivo estas mallonga kaj la scienco estas vasta; ni devas lerni, lerni, lerni! Al la lernado ni povas dediĉi nur parton de nia mallonga vivo, nome niajn infanajn kaj junulajn jarojn; sed hove! Granda parto de tiu ĉi kara tempo foriras tute neproduktive por la ellernado de lingvoj! Kiom multe ni gajnus, se dank' al ekzistado de lingvo internacia, ni povus la tutan tempon, dediĉatan nun al la neproduktiva lernado de lingvoj, dediĉi al la lernado de efektivaj kaj pozitivaj sciencoj! Kiel alte tiam leviĝus la homaro!...

Sed ni ne parolos plu pri tiu ĉi punkto, ĉar kiel ajn ĉiu el niaj aŭskultantoj rilatus al tiu aŭ alia formo de lingvo internacia, ni dubas, ĉu troviĝos inter ili eĉ unu, kiu dubus la utilecon mem de tia lingvo. Sed ĉar al multaj homoj, kiuj ne kutimis donadi al si precizan kalkulon pri siaj simpatioj kaj antipatioj, ordinare ŝajnas, ke se ili ne aprobas tiun aŭ alian formon de ia ideo, ili nepre devas ataki la ideon mem entute, — tial ni, pro sistemeco de nia analizo, petas ĉiun el la estimataj aŭskultantoj antaŭ ĉio noti al si bone en la memoro, ke pri la utileco de lingvo internacia entute — se tia estus enkondukita — li ne dubas. Ekmemoru do, sinjoroj, bone la unuan konkludon, al kiu ni venis, notu al vi kaj ekmemoru, ke kun tiu ĉi konkludo vi konsentas, nome:

La ekzistado de lingvo internacia, per kiu povus kompreniĝadi inter si la homoj de ĉiuj landoj kaj popoloj alportus al la homaro grandegan utilon.

POMOCNÝ JAZYK MEZINÁRODNÍ.

Francouzsky napsal univers. prof. Dr. *L. Couturat* — přel. *J. F. Khun.*

MEZINÁRODNÍ SLOVNÍK.[1]

Jazyk mezinárodní může se jen tehdy zdařiti, sblíží-li se co možno nejvíce s jazyky živými, co se týče zásoby slov. Na první pohled zdá se býti nesnadno sestaviti slovník v pravdě neutrálný a společný všem národům. Ve skutečnosti však již existuje slovník mezinárodní, mnohem bohatší a rozšířenější, než by kdo myslil. Především přemnohé výrazy vědecké a technické, vůbec z latiny a řečtiny odvozené, jsou ve všech jazycích evropských tytéž; nikdo věru ani nepomýšlí na utvoření nových.[2] Právě proto mají slova řecko-latinská občanské právo i v jazyku mezinárodním. Bude snad někdo namítati, že vědecká terminologie německá (i česká — Red.) činí výjimku tohoto pravidla. Ale především němčina má skoro vždy vedle slova germánského původu i druhotvar řecko-latinský, jenž právě je mezinárodní. (Příklad: Gesellschaft = Societät). Dále i tam, kde druhotvaru není, německé slovo daleko nemůže býti tak mezinárodní jako týž výraz řecko-latinský: Fernsprech nebude nikdy tak universálním jako telefon, Wissenschaft nikdy jako science. Konečně ani Němcům není obtíží, mají-li se naučiti technickým výrazům (na př. v chemii), jež voleny jsou z jazyka cizího.

Není však pouze slovník vědecký mezinárodním; veliký počet obvyklých, ano vulgárních slov je společný všem jazykům evropským.[3] Je zřejmo, že i všechna takováto slova ipso facto (sama sebou) patří jazyku mezi-

---

[1] Srovnej i článek »Esperanto a Rusové« — »Č. E.« I. str. 10—11. a »Formace Esperanta«, »Č. E.« I. str. 29—31. — Red.

[2] Příklady: *atom, axiom, architektura, vismut, borax, krystal, gaz* (ve složkách s odbornými výrazy technickými; pozn. překl.), *kytara, geometrie, mechanika, naturální, musikální, poesie, filosofie, minuta, sekunda, opál, safír, topas* atd.; *flauta, violoncello* atd.; *tygr, pardal* atd.; *plán, platina, rým, styl, these, zenit* atd.

[3] Příklady: *Pošta, telegraf, theatrální, tabák; ananas, anýz, artičok, bárka, buffet, bronz, karakter, karta, čokoláda, tanec, diamant, epocha, fabrika, flanel, forma, galerie, granát, lampa, limonáda, likér, lokomotiva, pantofel, park, plán, policie, portrét, renta, rýže, růže, sezona, sekretář, signál, sirob, sós* (sauce), *talent, terasa, toaleta, universita, valčík, vagon, víno* atd. (Viz »Č. E.« I. str. 10—11. — Red.)

národnímu, neboť i kdyby jazyka mezin. nebylo, každý by mi ve kterékoli zemi světa rozuměl, kdybych vyslovil nebo napsal takové slovo. Některá slova jsou společna alespoň třem jazykům, hlavně anglickému, francouzskému a německému.[4]

Je přirozeno, že se přijmou přede všemi ostatními k vyjádření souhlasných pojmů, jelikož sama sebou mají největší internacionalitu a rozumí jim většina cizinců.

I když některý kořen původně identický (totožný) v různých jazycích, v písmě neb výslovnosti se změnil, jako na př. nos (nez, Nase, nose), není-li tu záhodno užívati tvaru průměrného (na př. naz), když tu mnohem spíše význam se uhodne, než volí-li se zcela libovolně jiná hláska?

Stává tedy zcela, neb alespoň z části mezinárodní slovník a to již dosti objemný, jenž se stále rozhojňuje; je tedy přirozeným jádrem slovníku jazyka mezinár. Stačí jen doplniti jej tím, že přijme se pro každý pojem kořen nejinternacionálnější, totiž společný co největšímu počtu jazyků, alespoň dvěma; vždyť víme, jak přehojna jsou slova společná dvěma jazykům.[5] Pro pojmy, jež jsou ve všech řečích různými slovy vyjádřeny, vzaly by se nestranně kmeny z hlavních jazykův evropských nebo starých, tím, že by se vybraly nejkratší, nejzřetelnější a nejlibozvučnější.[6] Tato výběrová methoda umožňuje i odstranění druhotvarů z jazyků živých a rozlišování pojmů, jichž význam se zhusta plete, vyjadřují-li se jediným slovem; označilo by se to rozličnými kořeny, vzatými z různých jazyků.[7] Je patrno, že takto sestavený slovník byl by co možno nejmezinárodnější, a že by bylo každému národu co nejsnadnějším osvojiti si jej, poněvadž by každý alespoň polovinu kořenů znal předem.

---

[4] Příklady: *Káva* (*kafe*), *droga*, *familie*, *industrie*, *institut*, *novic*, *papír*, *perla*, *persona*, *pompa*, *sak* (na ryby), *thé* a j. — Viz »Č. E.« I. str. 29—31. — Red.

[5] Příklady: *Ship* (Schiff) by se spíše přijalo než *bateau*; *Schuh* (shoe) spíše než *soulier*; *dank* (thank) spíše než *remercier*; *send* než *envoyer* atd.

[6] Na př. *shirt* nebo *hemd* pro košili atd.

[7] V originále vyjmenována je řada francouzských slov, což pro českého čtenáře nemá významu. Pozn. překl.

PRAKTIKA KOMUNISMO.

De Dro *Cl. Heiss*, Berlino.

(Daŭrigo kaj fino).

Posedaĵojn de tero Eskimo ne konas, sed ŝajnas ekzisti ia interkonsento, ke sur loko, kiu jam estas loĝata, neniu sen permeso konstruas domon aŭ starigas tendon.

Naĝanta ligno apartenas al tiu, kiu ĝin unue trovas en akvo. Por havi rajton je ĝi, li devas eltiri ĝin sur landon ĝis super limo de akvoaltiĝo kaj signi ĝin per ia ajn signo. Ĉi posedaĵon Eskimo tre respektas; metinte ien tian akiron, li certe retrovos ĝin sur sama loko eĉ post kelkaj jaroj — se ne iaj Eŭropanoj venis tien. Kiu ĝin forprenus senrajte, estus malhonestulo.

Privata posedo estas ankoraŭ la hundoj kaj hundoglitveturiloj.

Eĉ ne tiu de li akirita ĉasaĵo rajte apartenas al unu grenlandano. Pri ĝia disdonado ekzistas malnovaj reguloj kaj nur kelkajn specojn de ĉasaĵo li povas grandaparte uzi nur por si kaj propra familio. Al tiuj specoj apartenas »atak« aŭ grenlanda foko, sed ankaŭ de ĝi li devas doni al siaj helpantoj kaj al ĉiu infano el sia hejmo peceton da lardo. Aliajn specojn de fokoj oni dividas inter tiuj, kiuj ĉeestis aŭ kunhelpis ĉe kaptado laŭ difinitaj reguloj. Eĉ loĝantoj de ĉiu domo ricevas iafoje pecon. De rosmaro kaj kelkaj specoj de balenoj restas al kaptinto nur malgranda parto, eĉ tiam, kiam li kaptis ĝin tute sola.

Kaj ne nur pli grandajn bestojn, ankaŭ fiŝojn oni dividas en simila maniero.

Se unu el ili akiras ian ĉasaĵon dum tempo de malsatado, tiam estas lia devo regali samloĝantojn, aŭ fordoni de sia akiro al tiuj, kiuj jam de longe ne havis freŝan viandon.

Se kaptado estis sukcesa, tiam ĉiuj manĝadas tiom, kiom estas ebla. Se ne ĉio estis formanĝita kaj ankaŭ en ceteraj domoj nenio mankas, oni provizigas la reston por vintro. Sed se venas tempo de mizero, tiam estas devo por tiuj, kiuj havas ion, dividi kun tiuj, kiuj havas nenion. Poste ili malsatas kune kaj ofte eĉ pereas kune pro malsato. Ke iuj el ili vivus en riĉeco dume aliajn turmentas mizero, tion oni ne vidas en Grenlando — se oni esceptas iajn Eŭropanojn, kiuj, estante laŭ natura emo antaŭzorgaj, havas provizojn, dum grenlandanoj malsatas.

Plej unua ŝtata leĝo de grenlandano estas: helpi al aliaj. Tio, kaj fidela kunhelpado en bona kiel ankaŭ en malbona tempo estas fundamento de ĉiu el tiuj malgrandaj grenlandaj komunumoj.

Malfacila vivo instruis la Eskimon, ke, se li eĉ povus zorgi sola por si mem, tamen venas iafoje tempoj kaj danĝeroj, en kiuj li devus perei, se li ne trovus helpantan manon, kiu lin savus, tial li mem estas ĉiam preta por helpi al aliaj.

»Kion vi volas, ke aliaj faru por vi, tion faru ankaŭ por aliaj«. Tiun ĉefan regulon de Kristo instruis al grenlandano naturo mem, kaj li praktike uzas ĝin, kion oni ne ĉiam povas diri pri kristanoj. Sed bedaŭrinde tiu instruo perdas ĝian potencon laŭgrade la grenlandano fariĝas civilizita.

Same kiel komplezo al sia najbaro estas leĝo, tiel ankaŭ gastamo ne signifas malpli. Vojaĝanto alvenas en ian domon kaj restas tie tiel longe, kiel plaĉas al li. Li estas afable bonvenata kaj laŭ ebleco regalata plej bone. Nenie oni devas pagi por tia gastado . . .

. . . Grenlandano havas sanan, akran, naturan prudenton kaj lernas rapide. Kiel provo ĉi tie estu lokita parto el letero de idolista grenlandano al misiisto Paul Egede, en kiu li plendas pri konduto de Eŭropanoj, pri ilia avideco, malamikeco kaj malĝentileco, fine li diras: »Vi rememoriĝas eble pri tiu propono de gaja Okakos, ke li volas sendi en vian landon sorĉistojn t. e. »Angekoker«, por instrui tie loĝantaron kiel oni fariĝas morala homo — tute tiel, kiel via reĝo al ni sendas pastrojn por instrui nin, ke ekzistas Dio, kiun ni antaŭe ne konis«.

Facile kaj rapide ili lernas legi kaj skribi. Dana registaro eldonas por ili en Godthaab, de 1861, senpage grenlandan gazeton »Atuagaglintit«. Ĉi gazeto de plej alta norda regiono eliras ĉiumonate, estas redaktata, kompostata kaj presata de Eskimo, kiu ellernis ĉi metion sur firmaĵo kaj ankaŭ ĝiaj kunlaborantoj estas Eskimoj.

Nansen finas sian libron, kiu estas inspirita de varma entuziasmo, kun severaj riproĉoj kontraŭ la kristanaj misioj kaj eŭropa kulturo, pro kies tuŝado tiu aminda kaj feliĉa popoleto alproksimiĝas al pereiĝo morala kaj korpa. Se oni ne forigas ĉiujn komercaĵojn, tien alportitajn, kaj kune kun la komercistoj per tiuj novaj ŝipoj de grenlanda

komerco forveturigos de tie, tiam pereos la tuta loĝantaro de tiu lando: »Rigidita senviveco de glaciaĵo etendos sin ĝis al maro kaj sur senhomaj bordoj nur mevoj kantos malgaje. Suno eliros kaj malsupreniros kaj ĝiaj radioj varmigos forlasitan landon. Nur malofte alproksimiĝos ia ŝipo al tiuj malgajaj bordoj — — —

Sed en longaj noktoj de l' vintro dancos la mortintoj strangan brilan dancon super eterna silentado de neĝa lando.«

El semajna revuo »Die Zeit« trad. *E.*

TVORBA SLOV V ESPERANTĚ PŘÍPONAMI.

Píše *Josef Krumpholc.*

(Pokračování.)

-in jest obdobné ruskému -inja (grafinja, knjaginja) a našemu -ina v ženských jménech: Kateřina, Karolina, Kristina, Justina a p. Značí bytost rodu ženského, jako: *viro* muž, *virino* žena; *cervo* jelen, *cervino* laň a p.: *patrino* matka, *filino* dcera, *fratino* sestra, *kuzino* sestřenka, *instruistino* učitelka, *lernantino* žačka, *kudristino* švadlena, *lavistino* pradlena, *servistino* služka, *mastrino* hospodyně, *anino* členka (spolku), *kokino* slepice, *meleagrino* krůta (ťopka) atd.

-ind (latinské – endus) odpovídá našemu hodný-á-é: *mirinda* podivuhodný, *laŭdinda* chvályhodná, *leginda* čtení hodné, *vidinda* pozoruhodný, vidění hodný, *kredinda* věrohodný, *sekvinda* následování hodný, *memorinda* pamětihodné atd.

-ing (z řečtiny) značí předmět (dutý) do kterého lze něco zapraviti, zastrčiti, vsunouti atd.: *glavingo* pochva (šavle), *tibiingo* holínka, *plumingo* držátko, *fingringo* náprstek, *piedingo* třmen, *kandelingo* svícen atd.

-ig mění všeliká slova ve slovesa účinná (faktitiva, kausativa), jež znamenají učiniti, by se dělo nebo stalo, co vyslovuje jich kmen: *morti* umříti, *mortigi* usmrtiti = učiniti, by někdo nebo něco umřelo; *alta* vysoký, *altigi* povýšiti, zvýšiti = učiniti vysokým, vyšším a p.: *timi* báti se, *timigi* strašiti, děsiti; *devi* museti, *devigi* nutiti; *venigi* objednati, *pereigi* hubiti, ničiti, *limigi* ohraničiti, omeziti, *liberigi* osvoboditi, *fianĉigi* zasnoubiti, *apartigi* odděliti,

beligi krášliti, *certigi* ujišťovati, tvrditi, *ĉesigi* zastaviti, *daŭrigi* pokračovati, *sendentigi* zbaviti zubů, *densigi* zhustiti, *disigi* odloučiti, *dolĉigi* osladiti, *amasigi* hromaditi, *sciigi* sděliti, podati zprávu, *haltigi* zastaviti, *sidigi* usaditi (někoho), *malĝojigi* zarmoutiti, *surdigi* ohlušiti atd.

-iĝ (z vlaštiny) měnívá slova ve slovesa zvratná s významem státi se: *pala* bledý, *paliĝi* zblednouti = státi se bledým; *sidi* seděti, *sidiĝi* posaditi se = státi se sedícím; *edzo* manžel, *edziĝi* oženiti se = státi se manželem a p.: *tagiĝi* rozedniti se, *vesperiĝi* ztměti se, *balanciĝi* houpati se, *ĉagreniĝi* zarmoutiti se, *maldensiĝi* řidnouti, *disiĝi* odloučiti se, *pliboniĝi* zlepšiti se, *alproksimiĝi* přiblížiti se, *rompiĝi* zlomiti se, *varmiĝi* zahřáti se, *algluiĝi* přilepiti se, *kungluiĝi* slepiti se, *sciiĝi* zvěděti, *krepuskiĝi* smrákati se atd.

VOJAĜO TRA »ESPERANTUJO«.

Rememoroj el jaro 1903 de *Ed. Kühnl.*

Sekvante proverbon: »Pli bone malfrue ol neniam«, mi decidis publikigi jenan artikoleton. Ĝi ne celas enui la legantaron per priskribo de urboj, kiun cetere ĉiu trovas laŭ bezono en literaturo nacia kaj kiun eĉ mi el la bohema kopius, ja eĉ per longaj priskriboj de nacioj kaj de iliaj moroj mi ne plenigos la artikoleton, kies materialo tamen estus sufiĉa por memstara libreto. Mi sciigos nur kelkajn amase kaj senorde alvenintajn impresojn, kiujn mi volas kiel koralojn per ora fadeno — per okazintaĵoj esperantaj — kunligi.

Sed por pentri eĉ nur impresojn, kiujn faras fremda lando, mi embarasiĝas: kion mi devas kaj povas rakonti al legantaro tiom diversnacia por ne tedi per aferoj al iuj konataj?

Por estimataj tieanoj ŝajnos ne unu rimarko kvazaŭ superflua, sensignifa, eĉ tion mi antaŭsentas, sed mi elektos vidopunkton, ke plimulto de miaj paciencaj legantoj estas ĉu Bohemoj ĉu fremduloj, kiuj ne ankoraŭ tiujn lokojn vizitis.

En miaj vojaĝaj rimarkoj mi retrovas eĉ kelkajn punktojn, kiuj meritus esti pli detale cititaj, sed manko da tempo kaj loko disponebla malpermesas tion.

Preskaŭ la tutan jaron mi rehaltiĝadis sub zorgo de nia ora patrineto centotura — kiel ni nomas ŝin — Praha, kaj kiel ŝia preskaŭ tuta geidaro, eĉ mi atendis la liberan tempon por forlasi la varman neston kaj forflugi en regionon novan — en »Esperantujon«. Tiel mi respondadis demandojn rilatajn mian forveturon.

Klarigon de tiu nekonata vorto devis alporti kaj ankaŭ alportis al demandantoj la plej baldaŭa tempo, kiam ili ricevis la unuajn leterojn kaj kartojn, kiuj ilin sciigis pri celo de mia vojaĝo: provi kaj pruvi la taŭgecon de Esperanto inter fremduloj alilingvaj. Tiel mi evitis antaŭ elveturo multajn mokojn, nome tiujn de homoj pli maljunaj, kiuj volus eble konvinki min pri malprudenteco de mia plano.

Nun al ĝia efektivigo.

La 4an aŭguston mi forlasis Bohemujon kaj la saman tagon mi jam troviĝis en München.

Tie mi restis unu semajnon por viziti ĉiujn konatulojn, kun kiuj mi amikiĝis en jaroj pasintaj kaj por entrepreni kelkajn ekskursojn per biciklo en ĉirkaŭaĵon. Sed tion mi ne ankoraŭ kalkulas en la vojaĝon esperantan mem, same kiel eĉ la pluan viziton de urboj Lindau, Zürich, Luzern kaj Bern — — — — — — — — — — — —

Kiam mi proksimiĝadis al Lausanne kaj Ouchy, la pejzaĝo montriĝadis ĉiam pli kaj pli pentrinda; ĉiuj kunvojaĝantoj — preskaŭ ekskluzive turistoj — elrigardas el vagonoj: neĝaj vertoj de alpaj grandeguloj altiras ilian atenton.

Jen malfermiĝas peco da tera paradizo: Lago de Genève. Malsupre kvieta helblua spegulo, borderita per freŝa verdaĵo, en kiu ruĝiĝas tegmentoj de belaj domoj. La vagonaro deveturas moderan krutaĵon, la postaj montoj plivideblîĝas — baldaŭ ni haltiĝis en stacidomo de Lausanne. Kelke da minutoj daŭranta veturo per ŝnurega fervojo kaj enŝipiĝo ebligas jam pluan liberan rigardadon sur montojn kaj baldaŭ aperas Mont-Blanc. Post trihora ŝipiro atingas la vojaĝantoj havenon de Genève.

De ĉi tie mi nomos mian pluan vojaĝon esperanta. En Genève mi elserĉis niajn unuajn samideanojn. Mi devas konfesi, ke ili ne estis multenombraj, ĉar, unue, estis ja

libertempo, kaj due, mi ne povis precize sciigi ilin pri tago de mia alveturo.

Ĝi estis la 12an de septembro tagmeze, kiam mi supreniris al loĝejo de s-o Renard, redaktoro de »Svisa Espero«. Mia unua esperanta interparolo en fremda lando. (En Praha mi havis jam ne unufoje okazon paroli esperante kun alilingvulo, sed tamen nun ĝi ŝajnis al mi pli kara — pli bezona!)

Preskaŭ tutan posttagmezon ni parolis promenante en stratoj kaj vizitante vidindaĵojn.

Kiel mi promesis en antaŭparolo, mi ne priskribos ilin; mi ja eĉ la kaŭzon nomis.

En agrabla interparolado esperanta ni daŭrigis ankaŭ la tagon sekvantan kaj vespere ni disiris kun varma deziro kiel eble plej baldaŭ revidi nin ĉu en patrujo de unu ĉu en tiu de dua.

La lastan tagon mi decidis viziti s-on Edm. Privat, redaktoron de »Juna Esperantisto.« Kun ĉi tiu afabla samideano mi pasigis la tutan vesperon — estis jam sufiĉe malfrue, kiam mi akompanis lin al lia loĝejo. — Antaŭ la ekdormo mi pripensis la pasintan tagon; ĝi ŝajnis al mi kiel revo; kaj tia ŝajnos eble la unua »esperante pasigita« tago al ĉiu, kiu havos okazon ĝin tiel agrable travivi.

Kaj ĝi estis la tago unua — — — —

LA AMO.

De *Petr Dejmek.*

La anĝelo de l' amo surflugis al tero kaj flugis tra la mondo por vidi, kiel la semo de l' Amo kristana en Teron ensemita kaj per homa sango tiomfoje malsekigita preskaŭ post miljaroj prosperas.

Li flugis, flugis, malsupreniĝante de l' ĉielaj altaĵoj malalten super la trankvilajn vilaĝojn, bruajn urbojn, super la senfinajn arbarojn, vastegajn kamparojn . . . enrigardis tra malgrandaj fenestretoj en malaltajn kaj malvastajn ĉambretojn, en mizerajn loĝejojn de l' malriĉularo, tra duone forigitaj kurtenoj li enrigardis en luksajn salonojn de riĉuloj, kaj serĉis la Amon, kiun ordonis Kristo, kiun

predikis lia apostolo Johano kaj multaj, multaj post li dum du miljaroj en ĉiuj flankoj de l' tero! Li serĉis la Amon, per kies ĉarmo devis ŝanĝiĝi la mondo, la infero en paradizon, malmola roko en molan kusenon, maldolĉa sekumita krusteto pana en la plej dolĉan manaon. Li serĉis la Amon, kiu devis el koroj homaj elsarki malamon, malveron, hipokritecon, malbonon kaj enplanti anstataŭ ili kompaton, veron, ĝojon, komplezon.

Serĉis la anĝelo, serĉis, sed ju pli longe li serĉis, des pli granda premis lin malĝojo kaj doloro: la malamiko diablo venis dume kaj en la tritikon ensemis agrostemon,[1] kiu elkreskis kaj sufokis la tritikon. La malamo enloĝiĝis en homaj koroj, la malveron oni pli adoris ol Dion, vizaĝojn siajn oni kovris per la plej malnobla hipokriteco kaj la maliceco vastiĝis tra la tuta mondo. Kaj estis neniu por gardi la forgesitan Amon. Certe multaj vokis: amu vin. . .! sed ili mem ne amis. Kaj se tamen inter milionoj elkreskis la homo, kiu enkorpigis en la faron grandajn vortojn de l' Amo, por kiu efektive ĉiu homo estis frato — la tuta homaro kun terura krio leviĝis kontraŭ li vokante: Jen, frenezulo . . .! kaj kraĉis sur lian puran, majestan talion.

La anĝelo flugis pluen tra la mondo, senlace serĉante. . .

Senfina dezerta kampo kuŝis antaŭ li. Kaj jen! Kio estas tie sur la kampo? Netrarigardeblaj nigraj vicoj post vicoj, vicoj kontraŭ vicoj. Fulmo post fulmo el unu nigra nubo transflugas al la dua kaj la tondrado estas senĉesa. Uragano? La anĝelo flugas pli proksimen . . . Tie en vicoj staras homoj kontraŭ homoj kaj post ĉiu fulmo homoj falas. La varma sango homa malsekigas la sekegan teron kaj en la teruran tondradon miksiĝas stertoroj de l' mortantoj, kiuj kun malbeno sur la lipoj anstataŭ vortoj de l' pura Amo eniras novan vivon, antaŭ tiun, kiu ordonis: Vi ne mortigos! kaj leĝo via estu la Amo . . .

Maldolĉegan larmon faligis la anĝelo sur la kompatindan teron kaj suprenflugis al ĉielaj altaĵoj . . .

El bohema gazeto »Čas« tradukis

Brno. *Jan Kajš.*

[1] Latine **agrostemma**, france **agrostème**, germane **Kornraden**, ruse **куколь**, boheme **koukol**.

KRONIKO.

Sub redakcio de *J. Grňa*, Lipová-Dřevohostice. Moravio.

Čechy. *Veřejná přednáška o Esperantě pro dobročinný účel.* Esperantský klub v Praze uspořádal 21. V. 04 ve prospěch opatroven »Filantropické družiny« v »Ženském klubu českém« veřejnou přednášku o významu a rozvoji Esperanta spojenou s přiměřenou výstavkou. Ke stu posluchačů vyslechlo řeč p. Kamarýta, pokladníka klubu, jenž posoudiv několik soustav jazyka mezinárodního, osvětlil přednosti a rozvoj Esperanta. Promyšlená a dobře přednesená řeč byla odměněna potleskem přítomných, z nichž mnohé přihlásily se do kursu esper. Dosažený úspěch oprávňuje k naději na založení odb. esper. Je to druhý úspěch v nejposlednějším čase. Jen vpřed! (H. K. B.)

Morava. *Spolek pro šíření Esperanta* v Brně pořádá v obchodní škole prof. Získala (Brno, Jakubská ul. č. 4., I. posch.) dva veřejné kursy esper., jeden pro Čechy, druhý pro Němce. Německý kurs byl zahájen 5. V. 1904 přednáškou p. Steiera; první hodina byla 11. V. 1904. Dalo se zapsati celkem 20 osob, ponejvíce studentů obchodní školy. — Český kurs zahájen byl 10. V. 1904. Za tím účelem rozeslal spolek koncem dubna pozvání česká a německá, z nichž uvádíme následující: Myšlenka řeči mezinárodní, jíž se zabývali přední mužové různých národů od staletí (Komenský, Bacon, Pascal, Descartes, Wilkins a j.), počíná se dnes uskutečňovati v řeči utvořené drem Zamenhofem, nazvané »*Esperanto*«. Ve všech zemích jest čilé hnutí pro pomocnou řeč světovou, nové a nové spolky a časopisy se zakládají pro šíření Esperanta, takže dnes není země, kde by nebylo spolku nebo aspoň většího počtu stou-

Bohemujo. *Publika parolado pri Esperanto por celo bonfara.* Esperantista klubo en Praha arangîs 21. V. 04 por bono de vartejoj de »Filantropia societo« en »Bohema klubo virina« publikan paroladon pri signifo kaj disvastigo de Esperanto kun esp. ekspozicieto. Preskaŭ 100 personoj aŭdis paroladon de s-o Kamarýt, kasisto de klubo, kiu prijuĝinte kelkajn sistemojn de lingvo internacia, montris superecon de Esp. kaj ĝian progreson. Pripensitan kaj bone faritan paroladon sekvis brua aplaŭdo de ĉeestantinoj, el kiuj multaj esprimis deziron viziti esp. kurson. Atingita sukceso esperigas fondon de sekcio esper. Ĉi tio estas dua sukceso en tempo plej lasta. Nur antaŭen! (H. K. B.)

Moravio. *Societo por vastigo de Esperanto* en Brno arangâs en komerca lernejo de prof. Získal (Brno, Jakubská ul. 4, I. posch.) du publikajn kursojn esper., unu por Bohemoj, alian por Germanoj. Kurso germ. estis malfermita 5. V. 1904 per parolado de s-o Steier; unua leciono estis merkrede 11. V. 1904. Partoprenas en kurso 20 personoj — pleje studentoj de komerca lernejo. Boheman kurson malfermis s-o J. Kajš marde 10. V. 1904. kaj unuan lecionon li donis 19. V. 1904. Por tiu ĉi celo dissendis nomita societo en fino de aprilo alvokojn boheman kaj germanan, el kiuj ni citas jenon: »Ideo de lingvo internacia, pri kiu okupiĝadis de kelkaj centjaroj eminentaj scienculoj de diversaj nacioj (Komenský, Bacon, Pascal, Descartes, Wilkins k. a.) efektiviĝas hodiaŭ en lingvo kreita de dro Zamenhof, nomita »*Esperanto*«. En ĉiuj landoj vastiĝas vigla movado por helpa lingvo internacia, novaj kaj novaj societoj aŭ gazetoj estas fondataj por vastigo de

penců řeči této, jež vlastní již 18 časopisů, mezi nimiž i vědeckou revui. Esperanto našlo horlivé přívržence ze všech tříd a stavů, od universitního professora až k prostému dělníku. Všichni užívají Esperanta s úspěchem buď k výměně myšlenek s přáteli z jiných zemí a národů, nebo v obchodním styku, na cestách a pod. . . .«

Anglie. Nové spolky esper. utvořily se v městech Leeds a Nottinghamu. — Pěkný propagační leták v jazyku anglickém »What is Esperanto?« vydal *Forest Gate Esperanto Group*. (Dle časopisu »The Esperentist«.)

Belgie. V poslední době i vědecké společnosti belgické počínají se zajímati o řeč mezinárodní. — Tak oznamuje časopis »*Belga Sonorilo*«, že ve schůzi vědecké třídy »*Královské akademie belgické*« 9. I. 1904 referoval s úspěchem generál de Tilly o výtečném díle »Historie jazyka mezinárodního«, jež sepsali pp. Couturat a Leau a pak vytkl program »Delegace pro zavedení jazyka mezinárodního«. V zasedání 6. II. 1904 otázka tato znovu uvedena na přetřes a usneseno pak následující: »Třída vědecká vyslovuje potřebu zavedení jednoho jazyka mezinárodního, nevylučujíc živých a mrtvých jazyků.«

Bulharsko. Pan Rjachovski z Gara Levski vydává pomocí dobrovolných příspěvků nový propagační orgán esper. »*Trumpetisto*« (Trubač), jejž zasílá zdarma. — Vyšlá dvě prvá čísla obsahují propagační články v jaz. bulharském a menší sdělení v Esper.

Francie. Nejčileji ze všech zemí evropských propagováno je Esperanto ve Francii. V četných městech stále konají buď přednášky, buď kursy o Esper. Výsledkem je založení 16 nových spolků esper. v krátké době od

Esper., ke hodiaŭ ne ekzistas lando, kiu ne posedus ian klubon aŭ almenaŭ pli grandan nombron da aliĝintoj de ĉi tiu lingvo, en kiu eliras jam 18 revuoj, inter kiuj unu revuo scienca. Esper. trovis fervorajn anojn en ĉiuj homaj klasoj kaj profesioj, de universita profesoro ĝis simpla laboristo. Ĉiuj kun sukceso uzas E. aŭ por interŝanĝado de pensoj kun amikoj el fremdaj landoj kaj nacioj, aŭ en komercaj interrilatoj dum vojaĝo k. c.« — **Anglujo.** En urboj Leeds kaj Nottingham estas fonditaj novaj grupoj esper. — Bonan propagandan folion en lingvo angla »What is Esperanto?« eldonis *Forest Gate Esperanto Group*. (El »The Esperantist«). — **Belgujo.** Eĉ sciencaj societoj komencas interesigi pri lingvo internacia. Laŭ »Belga Sonorilo« ni komunikas jenon: S-o generalo de Tilly kun sukceso raportis 9. I. 1904 en klaso de Sciencoj ĉe »*Reĝa belga Akademio*« pri bonega verko »Historio de lingvo universala« de s-oj Couturat kaj Leau kaj poste li resumis programon de »Delegacio por elekto de helpa lingvo internacia«. En kunsido de 6 II. 1904 tiu demando estis denove priparolita kaj akceptita jena rezultato: »Klaso de Sciencoj eldiras, ke unu lingvo estu universale akceptita, ne forigante vivajn kaj malvivajn lingvojn.«

Bulgarujo. »*Trumpetisto*«, senpaga esper. gazeto, estas nomo de nova propaganda organo, eldonata de s-o Rjaĥovski en Gara Levski, Bulgarujo kaj dissendata senpage. — Unuaj du numeroj enhavas bonajn propagandajn artikolojn en lingvo bulgara kaj nur mallongajn sciigojn en Esper. — **Francujo.** Plej vigla propagando esper. el ĉiuj landoj eŭropaj estas en Francujo. En tre multaj urboj senĉese estas farataj aŭ kursoj aŭ paroladoj pri Esper. Sekvo de tio estas, ke en nuna jaro estas fonditaj jam 16

nového roku. »Francouzská společnost pro šíření Esper.« sdružuje tedy nyní již 46 spolků esper. — Nynější ročník »*L' Espérantiste*« vychází v sešitech o 20 stranách; minulé ročníky obsahovaly sešity o 16 stranách. Příloha časopisu tohoto letos není vydávána, poněvadž beletristické práce otiskovány jsou v časopise samém.

Španělsko. »Suno Hispana« sděluje, že nakladatelská firma J. Espasa v Barceloně vydala španělské učebnice Esper. Možno tedy doufati, že známost Esper. šířiti se bude ve Španělsku rychlým tempem. — Pěknou přednášku o Esperantu konal 14. III. 1904 p. A. Sabadell ve schůzi »Stenografické akademie« v Barceloně. 27. III. 1904 usnesla se pak zmíněná akademie pořádati veřejný a bezplatný kurs o Esper.

Nizozemí. Právě vyšlo jarní číslo »*Holanda Pioniro*«. Psáno jest jen Esperantem. Časopis vycházeti bude čtvrtletně za roč. předplatné 3 fr. Adressa: Dreves Uitterdijk, Hilversum (Holando).

Rusko. Z Jalty (na Krymu) oznamuje se nám, že tamní horlivý šiřitel Esper. Dr. Ostrovskij hodlá uspořádati v místnostech klubu turistů (»Monta klubo«) stálou výstavku esper. učebnic, propagačních brožur, letáků atd. Výstavka slibuje úspěch. V létě totiž přichází na Krym do Jalty mnoho Rusů ze všech končin říše, by tam ztrávili příjemné léto. Lze proto doufati, že mnozí seznámí se takto s Esperantem a stanou se jeho šiřiteli každý ve svém kraji.

Amerika. Třetí ročník časopisu »*La Lumo*« tištěn jest změněnou abecedou esper., poněvadž kanadské knihtiskárny, které nyní vesměs tisknou sázecím strojem, nechtějí pro různé překážky tisknouti literami s akcenty.

novaj grupoj esper. Do »Societo franca por propagando de Esper.« enhavas jam 46 grupojn! — Ĉiu Nro de »*L' Espérantiste*« enhavas de nova jaro 20 paĝojn, anstataŭ 16 en antaŭaj jarkolektoj. »Aldono« ne eliras plu, ĉar literaturaj artikoloj estas presataj en revuo mem.

Hispanujo. El »*Suno Hispana*« ni sciiĝas, ke ĉefa libroeldonejo barcelona J. Espasa eldonis lernolibrojn por Hispanoj. Oni do esperas, ke Esper. de nun progresos rapide en Hispanujo. — Bonan paroladon pri Esper. faris 14. III. 1904 s-o A. Sabadell en »Stenografia Akademio de Barcelono.« 26. III. 1904 nomita akademio decidis malfermi publikan kaj senpagan kurson esper. — **Holando.** Eliris printempa Nro de »*Holanda Pioniro*« II-a jaro presita tute en Esperanto. Ĝi elirados kvaronjare por abono 3 frankoj. Turni sin al s-o D. Uitterdijk, Hilversum (Holando).

Rusujo. Energie propagandas Esper. Dro Ostrovskij en Jalta. Oni komunikas al ni, ke li intencas aranĝi en sidejo de »Monta klubo« en Jalta konstantan ekspozicion de esperantaj lernolibroj kaj diversaj propagandiloj. Ĉar baldaŭ alvenados Jalta-n multo da Rusoj el ĉiuj partoj de regno por pasigi tie agrablan someron, estas espereble, ke ili konatiĝos tiamaniere kun Esper. kaj fariĝos ĝia propagandantoj en sia regiono. —

Ameriko. Revuo »*La Lumo*«, III-a jaro eliras presata per ŝanĝita alfabeto esper., ĉar kanadaj presejoj, kiuj hodiaŭ presas per kompostmaŝino, ne volas pro diversaj malhelpoj presi gazeton per literoj supersignitaj. Kontraŭ uzado de literoj senakcentaj estas levataj energiaj protestoj, ĉar oni timas disfalon de *unueco*, kiu nun estas vere tre *bezonega* por Esperanto.

ORGANIZACIO DE KORESPONDADO (O. K.).

Klarigo de signoj: D = donas. Dez = deziras. K = kolektas. L = legas (en lingvoj . . .). P = parolas. R = respondas. S = skribas.

Unu anonco por ĉiu abonanto de »Č. E.« estas tute senpaga.

---

67. Bohemujo. (Aŭstrio). PLZEŇ, náměstí, radnice (aŭ Štěpánovy sady, 37.). — *Xaver Kutílek*, administranto en depagofico de reĝa urbo Plzeň. *LSP:* bohem., germ., Esper. *LS:* franc. *D:* Informojn pri Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo. *R:* Ĉiam tuj. Ankaŭ per leteroj. *K:* Kiel prezidanto de esperantista klubo en Plzeň kaj ĉirkaŭaĵo mi kolektas kaj interŝanĝas ilustr. poŝtkart. — Mi deziras konatiĝi kun geesperantistoj. * 1864.

68. Bohemujo. (Aŭstrio.) PRAHA, 1322-II. — *Vojtěch Kraus*, urba oficisto. *LSP:* bohem., germ., franc., Esper. *Dez:* Korespondi pri progresoj de lingvo internacia »Esperanto«. *R:* Per leteroj aŭ poŝtkartoj. * 1866.

69. Bohemujo. (Aŭstrio). GOLČ. JENÍKOV. — *Jindřich Novák*, kateĥisto. *LSP:* bohem., lat., Esper. *LS:* germ., franc. *Dez:* Korespondi pri botaniko. *R:* Per poŝtkart. ilustr. aŭ leteroj. * 1865.

70. Bohemujo. (Aŭstrio). PRAHA-ŽIŽKOV, Křištanova ul. 644. — *Josef Štelcík*, ŝamisto. *LSP:* bohem., german. *LS:* Esper. *Dez:* Korespondi pri aferoj esperantaj. *R:* Per poŝtkart. aŭ leteroj.* 1866.

71. Bohemujo. (Aŭstrio). PLZEŇ, Radeckého nám. 29. — *Eduard Stumpf*, studento de gimnazio. *LSP:* bohem., germ., franc., Esper. *Dez:* Korespondi pri cirkonstancoj de studentoj en fremdaj gimnazioj por celo de farota parolado. *R:* Esperante. — Mi deziras korespondi kun studentoj. * 1887.

72. Bohemujo (Aŭstrio). PRAHA II, Podskalská tř. 1982. — *Jaroslav Král*, studento de teknika lernejo. *LSP:* bohem., germ., franc., Esper. * 1885.

73. Bohemujo. (Aŭstrio). KLATOVY, Pražské předm. 65. — *Nohejl Hanuš*, studento. *LSP:* bohem. *LS:* Esper., *L:* germ., franc., lat. *Dez:* Korespondi pri rimedoj por klerigi popolon, pri antialkoholismo. *D:* Sciigojn pri movado stenografista kaj esperantista en Bohemujo. *R:* Tuj, per leteroj aŭ ilustr. poŝtkart., korespondos ankaŭ per stenografio bohema. — Mi deziras, ke Esperanto disvastiĝu inter gimnazianoj. * 1887.

74. Germanujo. MÜNCHEN, Rumfordstrasse 25, IV. — *Ludwig Emil Meier*, ekskapitano, ĵurnalisto. *LSP:* germ., franc., angl., Esper. *LS.* lat. *Dez:* Korespondi pri kio ajn, krom pri politiko. Mi korespondados por propagandi lingvon Esperanto kaj por servi al adeptoj kiel instruisto kaj konsilanto. *R:* Laŭ bezono per poŝtkart. aŭ leteroj. — Al alilandanoj mi sendos leterojn nur tiam, se estos aldonita poŝtmarko por respondo. * 1847.

75. Moravio. (Aŭstrio). VAL. MEZIŘÍČÍ. — *Alois Koláček*, studento. *LSP:* bohem. *LS:* germ., lat., Esper. *Dez:* Lerni Esperanton, per esperanta korespondado kaj pligrandigi mian kolekton da ilustr. poŝtkart. kaj poŝtmarkoj. *R:* Ĉiam al ĉiuj. * 1887.

Redaktor: Krumpholc Jos. — Vydavatel: Čejka Th.
Tiskem »Družstva knihtiskárny«, Hranice.

NOVAJ APEROJ EN LITERATURO

ESPERANTA aparte kaj INTERNACILINGVA entute.

En ĉi rubriko ni nur registrados novajn verkojn. Recenziojn pri apartaj libroj estos donataj ankaŭ plu en „Bibliografio". Ni povas raporti sole pri tiuj verkoj, kiujn ni ricevis (se eble en 2 ekz.).

M. Merckens, T. Cart & P. Fruictier: Esperanta frazlibro de l' turisto. (El jarlibro de Franca Turing-Klubo). Dua eldono. 80 pĝ., 0·50 fr., 12 ekz. por 4 fr., eldonita de »Lingvo Internacia«, Paris, 27, Boulevard Arago. — Wörtebuch deutsch-Esperanto unter Redaktion von Dr. Samenhof herausgegeben von **H. Jürgensen** und **M. Pagnier**. 234 pĝ., 2 Mk, Esperanto Verlag Möller & Borel, Berlin, Prinzenstrasse 95. — **Emile Chapelier:** Les Libertaires et la langue internationale Esperanto. (Collection de la Libereceana Esperantista Grupo Nro 1.). 47 pĝ., 0·10 fr., 100 ekz. por 6 fr. (+ transsenda pago). Eldoninto: Emile Chapelier, St. Gilles — Bruxelles, 34, rue de Rome, Belgujo. — **Prof. A. Fournier,** membro de medicina Akademio, Honora profesoro pri haŭtaj kaj sifilisaj malsanoj ĉe Medicina Fakultato en Parizo: Por niaj filoj kiam ili estos 18-jaraj (Esperantigis Dro Paul Rodet). Kun antaŭparolo de L. de Beaufront. 32 pĝ. (formato kiel »Č. E.«). 0·60 fr., A. Maloine, Paris, 25-27, Boulevard Sain-Germain. — **Dro J. Richard:** Campagne Scientifique du yacht »Princesse-Alice« en 1903. Observations sur la Sardine, sur le Plankton, sur les Cétacés, sur des filets noveaux, etc. Avec résumé Esperanto. (Scienca krozado de la ŝipo »Princesse-Alice« dum 1903. Observoj pri la sardelo, la planktono, la cetaceoj, novaj retoj, ktp.). Verketo estas skribita france kun Esperanta resumo kaj ĝi okupas Nron 11. (30. majo 1904) de »Bulletin du Musée Océanographique de Monaco«. 29 pĝ. Ricevebla ĉe »Musée océanographique« (Bulletin), Monaco.

Žádáme všech přátel, aby nám laskavě oznámili adresy, na něž bychom mohli úspěšně zaslati ukázková čísla našeho listu.